*Jiří Mahen:*

# *INSTRUO DE BIBLIAMANTO*

*Ekmutis sonoriloj, foras vortoj,*
*Sed haltas ni ankoraŭ super io,*
*Se ja atestas mond' pri grandaj sortoj,*
*En kor' dormetas taske nova scio.*

*Fortempe oni al ni memorigis*
*Ja sen kompren' de juna menso kion?*
*Nu, se ni super ĉio manon svingis:*
*Misteron havas temp' kaj eĉ Mesion.*

*Por granda tasko estas ni malmultaj,*
*El kompetentaj elektita unu —*
*Ne estas faktoj do fatal-rezultaj,*
*Ĉi ŝajna vero vin ne trompe punu.*

*Per logo antaŭiri por rikolto*
*Aliajn kaj ĝin poste firme teni —*
*Vi devas maturiĝi en hom-rondo*
*Kaj por ĉi rondo ĉiam brave peni.*

*Interne kiam flamas vi pro tristo,*
*Jen Mastro foje al vi venas ree,*
*Sukcesas tiam ĉio sen rezisto,*
*Ĉar benas Li vin, sian ilon kree.*

*Kaj staras la popol', sen laŭt' atendas,*
*Al vi espere supren rigardanta,*
*Eĉ nokta pez' minace se falpendas,*
*Li scias, estos ĝi lin respondanta.*

El la ĉeĥa Jiří Kořínek.

Lidové Noviny 18. 9. 1937 al morto de T. G. Masaryk.